

1921-09-07-sergeant-fousek_1

Kara amiko.

Kun ĝojo mi ricevis vian leteron de la 3-a kaj vian P.K. de la 30-a de Aug. Mi prokrastis mian leteron respondantan al via P.K. ĝis mi ricevis vian leteron.

Nun, kara samideano, ĉu vi bonvolas granuli vian edzinon & diri al ŝi kiel mi ĝojas ke ŝi bone fartas & ke ŝi havas unu el la plej grandaj feliĉoj – infaneton ŝian!!! Nun, ŝi komprenos la patrinan senton vidante tiun malfortan kapon apud ŝi – estaĵo de ŝia estaĵo.

Kaj, vi, kiel vi baldaŭ ĝojos ankaŭ havi identiton vian – sed via vera ĝojo venos post la al kutimiĝo al tiu nova estaĵo kiu venis & interrompis vian trankvilan kutiman vivon. Do, gratuloj miaj al ambaŭ feliĉaj gepatroj....

Mi kredas laŭ viaj dankoj pri miaj P. K. & memoroj ke vi ne ricevis mian longan leteron de la 22-a de Aug. skribitan responde al la via tiel bela kiun mi trovis hejme revenante la 20-an. Se tio estas ebla & vera mi furioziĝos, ĉar mi skribis ĝin spontane, kun ĉiuj impresoj de l'Kongreso tute freŝaj en mia menso. Ho, diru al mi ke vi ĝin ricevis & ke vi forgesis paroli pri ĝi.

Mi ofte de post la 11-a (tago kiam vi skribis vian leteron) pensis al vi kiel vera prokrastemulo ĉar ŝajnis al mi ke tiuj 20 tagoj estis iom tro longe sen skribi pri via ido.

1921-09-07-sergeant-fousek_2

& en mia menso, mi ofte rememoris ke vi, ia foje diris al mi ke impresoj ĉe vi ne daŭris longe & vi estis kiel papiliono. & mi pensis, kiel tio estas vera.

Sed, nun, kiam mi scias ke via ideto nur venis la 30-an & sendube vi ne ricevis mian leteron, mi eble pli facile komprenas vian silenton.

Ĉu vi rimarkis ke mi estas pli bona kuracistino ol via de Přelouč. Li diris ke Eva alvenos la 5-an. Mi diris Certe, ŝi alvenos eble 3 semajnojn pli malfrue. Estas ĉiam la sama afero.

Efektive, tiu nova viva modo por vi devas ŝajni tute stranga. Vi ne plu estas 20 jara kiam oni facile alkiutimiĝas al ĉio – via vivo estas jam ordonita & ĉiu ŝanĝo ĝenas vin – sed post kelkaj semajnoj vi estos feliĉega, vi vidos. Ĉu la 2-a nomo de Eva ne estas „Stella“? Vid iris ke tio estos.

Mi ŝatus skribi al vi ĉion kion mi skribis la 22-an de Aug. sed mi forgesis & mia animstato ne permesos hodiaŭ tion fari. Kvankam la kongresaj impresoj estas tiel fortaj kiel en la unuaj tagoj – eble pli – ĉar kiam oni pensas ĉiutage al io. Tio pli grandiĝas & pli fortiĝas, ĉu ne?

Ĉu vi prenis vian knabineon sola al la kuracisto? & se jes? Ĉu vi sciis porti ŝin konvene? Sendube via edzino multe ĉagreniĝis pri tio? Fine „tout est bien qui finit bien“ & mi ĝojas

1921-09-07-sergeant-fousek_3

Tuj kiam mi scias ĉu vi ricevis mian leteron mi provos retrovi iomete tion kion mi diris (se vi ne ricevis ĝin).

Mi preskaŭ skribi al via kuzo (de via edzino) klarigante al li kial ni ne vizitos lin (manko da tempo) & samtempe petante de li ĉu li sciis kio okazis ĉe vi pri la naskiĝo – tiel mi timis malbonaĵon vidante ke dum 20 tagoj vi ne skribis. Kiam vi skribos – aŭ vidos lin, buvolu klarigi al li kiel mi ŝatus revidi lin sed ne povas.

Advokato de tie, entuziasmata je nia vojaĝo volis fari la saman & forlasis Boulognon antaŭ 5 tagoj. Li mangos ĉiutage en Reprezentanta Domo, je nia sama tablo kun nia ĉarma sama Kelnero – li restas en la Hotelo de l'torte bleue – k.t.p. la feliĉa homo. Revidi reprezentan Domo!!! Kiel Feliĉo. Tamen, mi kredas, ke ne estos necese, ĉe mi. Mi povas vidi image ĉion – ĉion – ĝis la ornamentaĵoj de ĉiu salono, de ĉiu sidloko – de la logio – mi aŭdas ankoraŭ la bruon de la ĉapeloj kiuj ventumis por refreŝigi la aeron. Antaŭ mi, mi mi vidas la belegajn kostumojn en la balo, mi dancas... & ŝajnas al mi ke mi estas tie vere tiel la impresoj estis fortaj.

Revenante hejmen post belaj impresoj en nia belega Parizo, mi trovis 3 leterojn bonvenantajn min hejmen – vian, unu el Meksikujo kaj la 3-an

1921-09-07-sergeant-fousek_4

el mia malnova amiko el Stockholm. Mi ĝojis, legante ilin. Mia korespondanto el Tampico (Meksikio) gravuris la ledan stalaĵon kiun mi presigis sur tiu papero – sed ĝi, laŭ mia opinio, estas multe tro malgranda – ĉu ne?

En mia letero mi rakontis al vi la fortan impreson kiun faris al mi s-ino Z. rakontante ke mia amiko D-ro A. Zamenhof sin mortigis la 24-an de Jul. 1916. Tagon kiam li skribis al mi sian lastan leteron. Mi ĉiam kredis ke li mortis subite. Imagu mian emocion. Sed eble vi scias tion laŭ mia letero.

Mi ĉiam rigardas detale, emocie, la belajn vidaĵojn en Praha (en la vidaĵlibro). Ho, belaj tagoj forflugitaj, ĉu vi revenos iam? Kaj belaj estas la poezioj de Schulhof – ofte mi legos ilin.

Mi pasigis la tutan posttagmezon je la marbordo. Estis granda amaso da personoj – estis varmega & la sunkuŝiĝo belega. La nigra fumo de l' ŝipoj pasante antaŭ tiu ruĝeco vualis ĝin & oni vibris vidante tiujn belajn kolorojn. La maro estis pale verda & poste ruĝa. Matene, post mastrumado, mi ludis tenison sed en la nunaj tagoj mi ludas malbone. Mi ne scias, kial. Eble la kaŭzo estas en mia anima stato...

Mi ne tute diras „Ne“ por Helsinki – oni neniam scias. Mia amiko invitis min en Stockholm resti ĉe lia hejmo. Ĉu vi opinias ke oni devas meti sia aŭ lia? Ĉu la vorto „resti“ ne estas verbo en alia frazo – do – lia? Kiam vi respondos rememorigu la tutan frazon al mi.

La estonteco montros. Estas nun la 10a p. m. kaj mi havas fortan kapdoloron & ne skribas kiel mi ŝatus. Mi provos daŭri morgaŭ. Do, bonan nokton & ĝis morgaŭ

Leteron de s-ro Legrand mi ricevis – bedaŭrinde li ne povis enŝipiĝi tie sed el Cherbourg li diris ke li eniris iun kiu estis tiel ofte kun ni.